



La ^{Ziko van Dijk} ASocio

Skizoj kaj studoj el la historio de UEA



La Asocio

La Asocio

Skizoj kaj studoj
Pri la historio
De UEA

Ziko van Dijk

La asocio

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi e-libro rajtas esti kopiita senkoste kaj transdonita al kiu ajn.

Biblioteko Hector Hodler: La libroj de la Asocio

Por lingva komunumo kiel la esperanta, kies anoj vivas en diversaj landoj, la skribita vorto havas specialan gravecon. Tiu trezoro kultura kaj historia estas gardata interalie de la malgranda grupo de Esperanto-bibliotekoj, kiuj pro amplekso kaj organiza grado distingas sin de pli granda grupo. Krom ekzemple la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kaj la svisa Centro de Dokumentado kaj Esploro de la Internacia Lingvo, al tiu malgranda grupo apartenas ankaŭ Biblioteko Hector Hodler (BHH), posedaĵo de la tutmonda organizaĵo de la Esperanto-parolantoj, Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Tiu biblioteko estas firme ligita al la evoluo de la Asocio, kaj pluraj gravaj personoj el la historio de Esperanto dediĉis sin al ĝi: René de Saussure, frato de la fama lingvisto Ferdinand de Saussure, Eduard Stettler, poste prezidanto de UEA, Hector Hodler, unu el la fondintoj, Hans Jakob, dum multaj jaroj en diversaj gvidaj funkcioj, kaj Victor Sadler, redaktoro kaj direktoro.

A. Svisa periodo

1. Svisa Esperanta Biblioteko, 1908-12

Post kiam Ludoviko Zamenhof publikigis en Varsovio 1887 sian «internacian lingvon», daŭris iom da tempo ĝis fondiĝis lokaj grupoj kaj fine naciaj societoj. Unu el la plej malnovaj estas Svisa Esperanta Societo, fondita en 1903. SES havis propran gazeton ekde la sama jaro, *Svisa Espero*, kaj pro ĝi en la oficejo en Berno ekkolektiĝis publikigaĵoj: libroj por recenzoj kaj gazetoj ricevataj de aliaj Esperanto-asocioj.

En somero 1908 juna, freŝbakita esperantisto provis konvinki la svisojn pri la fondo de propra biblioteko. Eduard Stettler (1880-1940) turnis sin al René de Saussure, vicprezidanto de SES kaj fondinto de scienca oficejo en Ĝenevo. Stettler argumentis ke oni bezonas centran Esperanto-bibliotekon, ĉar ja ĝuste la esperanta literaturo estis la plej firma barilo kontraŭ la tiam nova planlingva projekto Ido. Sed multaj fervoraj esperantistoj estas malriĉaj oficistoj kaj instruistoj, kiuj ne povas mem aĉeti ĉion. Tiu biblioteko ne estu konkurenca al la grupaj bibliotekoj, sed «alplenigo», por kolekti la pli multekostajn verkojn, dokumentojn de la svisa movado, propagandilojn ktp., kaj ĝi povos pruntedoni. Sed Stettler timis la venontan ĝeneralan kunvenon de SES en Friburgo, nome ke tiam oni ŝovos la aferon al fora estonteco, pro manko de mono. ¹

Tamen la junulo sukcesis en septembro en Friburgo akiri aprobon malgraŭ skeptikoj. En oktobro li informis la SES-gazeton pri la fondo de biblioteko kiu kolektu ĉiujn svisajn esperantaĵojn kaj la plej interesajn eksterlandajn. «Pli poste ĝi estos certe la plej bona trovaĵo por la historio de la movado.» ² Fine, en decembro 1908, la societo oficiale kreis Svisan Esperantan Bibliotekon, SEB. ³

El la du ekzempleroj, kiujn BHH havas de katalogeto el marto 1909, la ekzemplero de la helplibrotekisto Otto Schmid estis supozeble uzata en la biblioteko. Ĝi estas kartonita, havas truon por ŝnuro kaj ricevis enŝovitajn blankajn paĝojn, sur kiuj manskribe aldoniĝis klarigaj notoj. Laŭ la Regularo en ĝi, kun dato de la 22-a de decembro de 1908, SEB

situus en Berno kaj estis posedaĵo de Svisa Esperanta Societo, kiu donis jaran subvencion («laŭpove») kaj presaĵojn alvenantajn al la oficejo. La societo instalas bibliotekan komitaton kun prezidanto, vicprezidanto (nova SES-prezidanto René de Saussure), sekretario, kasisto, helpanto, bibliotekisto kaj helpbibliotekisto, tiam respondeca pri la pruntado, kiu okazis ankaŭ per poŝto. ⁴

Bibliotekisto Stettler enkondukis sistemon kun ok klasoj, kiu donas ankaŭ superrigardon pri la enhavo de la kolekto: Helplingvo, Literaturo kaj Arto, Scienco kaj Tekniko, Periodaĵoj, Oficialaĵoj, Uzado de Esperanto, Aliaj mondlingvoj, Diversaĵoj. Laŭ la modelo de la Svisa Nacia Biblioteko, li uzis malgrandajn, mezgrandajn kaj grandajn kartonajn skatolojn, ĉar multo ne estis bindebla, interalie pro la kostoj. Ĉiu el la ok klasoj havis propran koloron por la etiketo (la klasoj ne plu ludas rolon nuntempe, sed la kestojn oni ankoraŭ uzas en Roterdamo). ⁵ La menciita katalogo ordigas unue laŭ la klasoj kaj poste laŭ la aŭtoro nomo, kaj videblas ke la kolekto konsistis tiam nur el libroj kaj periodaĵoj el 1902-09. Laŭ la jarĉefkunvena raporto de Stettler en oktobro 1909 la kolekto havis tiam pli ol okcent «numerojn», interalie pli ol cent kvindek binditajn volumojn. El la donacintoj de multaj libroj kaj gazetoj li menciis speciale René de Saussure. ⁶

En aŭgusto 1909 Stettler translokiĝis al Ĝenevo, kaj lin sekvis granda parto de SEB. Otto Schmid en Berno tamen tenis provizore alian parton por daŭrigi la pruntedonadon. ⁷ Kio en retrospektiva priskribo aspektis kiel dujara staĝado, ⁸ laŭ la origina intenco estis projekto por nova vivfazo de la 29-jara Stettler. Julie en letero li nomis sin «tro maljuna por ĉiam vivi el mia patro», kiu estis advokato el riĉa patricia familio, kaj «multe tro juna por ekzisti el miaj modestaj rentoj». En Berno, li klarigis, mankas al li oficisto por la malgrandaj laboroj en la biblioteko, kaj precipe taŭga loko: estis ne eble akcepti gastojn en ĉambreto kun lito. Kiam li vizitis la UEA-administranton Hector Hodler en Ĝenevo, ili parolis pri ordigado de dokumentoj kaj administrado de fondotaj servoj, ankaŭ por havi novajn enspezojn por UEA. Stettler do intencis riski iom da kapitalo, eble kvin mil aŭ dek mil frankojn, kaj aranĝi en Ĝenevo, sed prefere en Berno, oficejon por propagando kaj vendado de libroj. ⁹

En Ĝenevo Hodler kaj Stettler rapide ekforĝadis planojn, kuraĝigite de

SEB-prezidanto Friedrich Uhlmann: En Svislando malfacilas akiri Esperanto-librojn kaj propagandilojn, kaj la eksterlandaj kompanioj postulas tro altajn prezojn. Kial ne fondi svisan oficejon kaj eldonejon, kiuj estu samtempe biblioteko, arkivejo kaj librovendejo. Ĉar asocio ne povas salajri la oficejestrinon, la oficejo estu propraĵo de privatulo, al kiu oni lasu la profiton sub la kondiĉo, ke SES ricevos rabaton por oficialaj mendoj. Tiel gajnadas ekzemple Möller kaj Borel en Berlino. [10](#)

Samtempe Hodler kaj Stettler parolis pri tio, ke SES donacu sian bibliotekon al UEA. Uhlmann malkonsentis. La svisa biblioteko ja estiĝis per donacoj de svisoj, kaj por multaj svisoj la sorto de SES estas eble pli grava ol tiu de la monda asocio. Se oni do donacas, li argumentis, tiam nur sub kondiĉoj. Ekzemple la svisa societo havu la rajton reaĉeti ĝin, kaj UEA daŭre ebligu la abonadon de la pruntedona servo. La arkivejo de dokumentoj kaj propagandiloj restu ĉe SES, kiun la bibliotekisto prizorgu tute sendepende de la monda asocio. [11](#)

Kiam UEA-administranto Hodler informis siajn estraranojn pri la plano, la kondiĉoj estis laŭ li: la biblioteko restu ĉiam en Svislando, estu uzebla de la svisoj kiel nun, kaj UEA certigu la materian prizorgadon. Hodler ĝojis pri la propono, unue ĉar laŭ li la biblioteko povos per UEA pli facile pliriĉiĝi, kaj due ĉar la pruntedonado de libroj al membroj estos nova servo de la juna monda asocio. Oni aldonu cetere la jaman UEA-arkivon al la kolekto, kaj ĉio estu estonte en Ĝenevo. Hodler anoncis ke oni okupiĝos pri la aranĝo dum oktobro 1909. [12](#) Ion similan oni legas en la oktobra *Svisa Espero*, nome ke Stettler kaj de Saussure dum la svisa jarĉefkunveno proponis al UEA cedon de la biblioteko kun daŭra rajto de la svisoj uzi ĝin. [13](#)

En kolekto de projektoj pri regularoj, en la manskribo de Hodler, troviĝas ankaŭ regularo pri Esperantia Biblioteko. (*Esperantio* estis tiam alia vorto por la UEA-membraro.) Ĝi kolektu ĉion eldonitan en Esperanto, enhavu krome la arkivon de UEA, kaj publikigu ĉiujare katalogon de la nove alvenintaj libroj. Plurloke videblas ke oni pensis pri biblioteko en kombino kun libroservo; ĝi disponigu al membroj tiujn librojn menciitajn en la katalogo, «laŭ la prezo de vendo». Por plifaciligi tion oni enkonduku kontojn por la membroj. Oni optimistis ke la eldonistoj sendos du ekzemplerojn de ĉiuj eldonaĵoj, en interŝanĝo kun prospektoj kaj reklamoj de UEA. La enspezoj de *Librejo & Biblioteko* iru je unu duono al la

bibliotekestro por kovri la oficelspezojn, je unu kvarono al la rezervo de UEA, kaj je unu kvarono al formota kapitalo por la prizorgado de la biblioteko. Kiel «subfakestron biblioteko» oni elektu Eduard Stettler. ¹⁴

Sed ial la cedo tiam ne okazis, Hodler en raporto de novembro 1909 ne plu menciis la bibliotekon. ¹⁵ El la planoj realiĝis almenaŭ la vendejo, lige al la translokado de la CO. Ĝi nun troviĝis en pli granda loko, en la teretaĝo de la strato Rue de la Bourse 10 en Ĝenevo. La libroservo nomiĝis *Universala Esperanta Librejo* de UEA kaj funkciis sub Direktoro Stettler, kiel informis *Esperanto* la 3-an de novembro 1909.

Kiel sube priskribite, la societo poste en 1912 tamen vendis la kolekton troviĝantan jam en la UEA-oficejo. Sed la esperantistoj en Svislando ŝajne sentis daŭran bezonon je biblioteko, kaj ekde februaro 1914 *Svisa Espero* aperigis informojn pri alia, dua kolekto, kun la nomo Svisa Esperantista Biblioteko. Komparo inter la katalogeto el 1909 kaj katalogo en kajeroj de *Svisa Espero* el 1916 kaj 1917 montras ke la dua kolekto estis kvazaŭ daŭrigo de la unua. ¹⁶ Aprile 1914 la nova Biblioteka Fakto menciis sian celon kolekti librojn kaj krei «nomaron» (registraĵon) de ĉiuj originalaj kaj esperantigitaj verkoj, sendepende ĉu la societo posedas ilin aŭ ne. La lingvoinstruisto Ernst Krenger el Utzenstorf (apud Berno) elektiĝis bibliotekisto kaj konsentis disponigi en sia propra loĝejo lokon por la libroj, sed nur dum la bibliotekaĵoj estas ankoraŭ stokeblaj per unu granda ŝranko. En 1915/16 nur du esperantistoj mendis librojn kaj – ilin eĉ ne resendis. ¹⁷

2. Posedaĵo de Hector Hodler

Hector Hodler (1887-1920) estis la filo de la fama, riĉiĝinta svisa pentristo Ferdinand Hodler kaj lernis Esperanton en 1903. Kune kun Théophile Rousseau el Francio kaj aliaj, li fondis en aprilo 1908 Universalan Esperanto-Asocion kiel internacian asocion, kiu utilu al siaj membroj per praktikaj servoj kaj sekve al Esperanto ĝenerale. La Asocio tiutempe celis aktivi same sur loka kaj landa niveloj kaj ankaŭ kun la adeptoj de diversaj fakoj kaj specialiĝoj. Tion ĝi fakte atingis nur longe poste, per la organizita kunlaboro kun memstare fonditaj landaj kaj fakaj asocioj; sed tamen ĝi jam antaŭ la unua mondmilito rapide kreskis al grava faktoro en la Esperanto-komunumo. Hodler fariĝis direktoro kaj restis ĉefredaktoro de sia gazeto *Esperanto*, la oficiala asocia organo.

Laŭ diversaj mencioj la svisa societo vendis sian bibliotekon al Hodler en 1912, ¹⁸ sed detalaj sciigoj pri la transiro mankas. En tiu jaro Stettler kiel estro de la financa fako de UEA iniciatis grandan financon reformon, al kiu apartenis la enkonduko de Garantia Kapitalo. Ĝi protektu la Asocion kontraŭ neantaŭvideblaj defecitoj kaj disponigu monon por specialaj projektoj aŭ donu komencan kapitaleton por novaj servoj. La garantianto, paginte unufoje minimume 125 svisajn frankojn, ricevis dumvive la asocian organon kaj rajtis kundecidi pri la uzo de la Kapitalo. ¹⁹ En la numero de la 20-a de februaro 1913 *Esperanto* publikigis la unuan liston de garantiantoj, sur kiu troviĝas ankaŭ Svisa Esperanta Societo kun 125 frankoj. ²⁰ Tiu sumo estis fakte pagita de Hodler, kiu kompanse ricevis la svisan bibliotekon. Ĝia nomo fariĝis *Universala Esperantia Biblioteko*.

Laŭ *Svisa Espero* en februaro 1909 la kolekto valoris pli ol 350 svisajn frankojn. ²¹ Por komprenigi per komparo: En la tempo de la transdono la simpla UEA-membreco kun Jarlibro kostis 2,50 frankojn. Supozeble pro la diferenco inter taksita valoro kaj ricevita kontraŭvaloro oni ne emis sciigi publike pri la cedo.

En 1912 la germano Hans Jakob (1891-1967) venis al Ĝenevo por resti du jarojn kaj perfektigi en la franca lingvo. Hodler varbis lin por labori en la Centra Oficejo. La biblioteko konsistis el ordigita parto kaj aro da kestoj plenaj de libroj; Hodler aĉetis ĝin de la svisa societo «por ridinda sumo»,

skribis Jakob en la 1950-aj jaroj. Prizorgante ekde 1913 la libroservon, Jakob en sia libertempo okupiĝis pri tiu privata biblioteko de Hodler. Ĝi havis proksimume naŭcent erojn, ripozantajn en kestoj. Hodler kontribuis, pere de sia gazeto *Esperanto*, modestan sumon por novakiroj. En 1912 oni aĉetis kvarfakan klasil- aŭ sliparejon, en 1913 verdan abian ŝrankon, en 1914 bretaron, klasilmeblon, du malnovajn tablojn kaj du seĝojn. ²²

Kvinpaĝa tajpaĵo de Stettler por Jakob, sen dato sed supozeble el printempo 1913, provizas ian momentan superrigardon pri la kolekto. Oni vidas ekzemple la subdividojn en la kategorio O (Oficialaĵoj), interalie kun O.I Kongresoj, O.IV Svisa Esperanta Societo kaj O.VIII Delegacio en Parizo «kaj tio kio rilatas al Ido kaj alia merdo». Stettler klarigas kiel oni trovas verkon indikitan en la «kontrollibro»– temas verŝajne pri la katalogo el 1909 kun enmetitaj paĝoj por novaĵoj – kaj admonas doni al novaĵoj stampon kun numero laŭ la kontrollibro. Jakob atentu ankaŭ ne ŝanĝi jam ekzistantan ordon. Plej ofte estiĝis senordo, laŭ Stettler, je la gazetoj nebinditaj, kaj estis krome en ŝrankoj «grandaj kolektoj da neprilaborita materialo». Cetere Jakob selektu la enhavon de O.IV por la svisa societo, krome du volumojn de *Svisa Espero* kaj grandan skatolon kun leterkolektoj, ĉio tio restas posedaĵo de SES. Kolekto de poŝtkartoj kaj kongresinsignoj apartenas al Stettler mem. Por la materialoj de UEA estu kreota propra ordo kaj registrado. «Mi tre ĝojus se vi povus reordigi la kolekton, kiu siatempe kostis multe da tempo al juna Schmid kaj mi. Ĝi indas la laboron kaj pliampleksigon.» ²³

Kaj la biblioteko kaj la revuo *Esperanto* (kvankam oficiala organo de UEA) restis privataj posedaĵoj de Hector Hodler, kaj ili kompletigis unu la alian, ĉar alvenadis novaj libroj por recenzo. Krome ĝi pligrandiĝis pro librodonacoj de esperantistoj. Dum 1917-20, kiam Jakob oficis por aŭstria ministerio, la kolekto estis sen prizorgo. ²⁴

3. Biblioteko de UEA, ekde 1920

En 1916 la mondmilito prenis de UEA prezidanton Bolingbroke Mudie kaj vicprezidanton Rousseau, en 1919 la tuberkuloza Hodler iris de la direktora posteno al tiu de la prezidanto. Eduard Stettler fariĝis nova direktoro, kaj ĉar li ne povis denove restadi en Ĝenevo, la oficejo translokiĝis al Berno, supozeble ankaŭ la biblioteko.

Sed jam en marto 1920 Hodler mortis, 33-jara, en sanatorio. Stettler transprenis la novorganizon de la Asocio, kaj fine de la jaro li estis elektita. Li ricevis de la vidvino Emilie Hodler-Ruch la rajtojn je la gazeto *Esperanto*, je la biblioteko, kaj valorpapirojn kiel kapitalon por la estonteco. ²⁵ Tiam la biblioteko havis, laŭ Jakob, inter 3000 kaj 4000 erojn. ²⁶ La oficejo estrata de Hans Jakob revenis al Ĝenevo, kiu intertempe estis ankaŭ la sidejo de la Ligo de Nacioj, kaj tial por internacia asocio speciale interesa. Cetere oni pagis en la kantono Ĝenevo malpli da impostoj por la postlasaĵo de Hodler; tamen pro la altiĝantaj kostoj en Ĝenevo, retrospektive la utilo estis tre duba.

La Biblioteko de UEA ricevis en la statuto de 1920 mallongan mencion kaj ekde 1924 estis subvenciata de UEA. ²⁷ Sed en la planoj por la estonteco de la movado ĝi devis ankoraŭ konkurenci kun la biblioteko de la Esperantista Centra Oficejo en Parizo. Tion montras propono pri nova tutmonda asocio, kiun *Esperanto* publikigis en 1922. ²⁸ La memstara oficejo en Parizo, financata de privata mecenato kun simpatio de la naciaj Esperanto-societoj, ne estis daŭrigata en tiu formo kaj en 1929 oni donacis ĝian bibliotekon al la loka Komerca Ĉambro. ²⁹

La reveninta Jakob fariĝis en 1920 estro de la oficejo kaj havis apenaŭ tempon por la Biblioteko de UEA. Foje helpis Edmond Privat, la redaktoro de *Esperanto*. Prezidanto Stettler komentis: «Do, ankaŭ amiko Privat falis en la paperan alogilon. Kiel aliaj, li ĉesos post iom da tempo, vidante kun teruro kiom da laboro forrabas la ordigo.» Samtempe Stettler admonis al Jakob ke UEA ne havas monon por aĉeti kolektojn, kaj se iam venos mono, oni uzu ĝin «por la bonformo: ordigo kaj bindado. La celo ja estas eĉ pli reklama: montrado al vizitantoj, ol scienca.» Laŭ la respondo de Jakob, la biblioteko evidente ne estis tre montrebla: La binditaj libroj

multe suferis pro polvo kaj neegaleco de la bretaro. [30](#)

En la jaroj 1926-30 pri la biblioteko okupiĝis Petro Stojan el Besarabio, kaj de 1931 ĝis 1933 deĵoris la Esperanto-verkisto Henri Vatr . [31](#) La UEA-Jarlibro nur ekde 1927 menciis la bibliotekon, kiel unu el la du taskoj de la (helpa) redaktoro Stojan. La postan jaron la Jarlibro informas ke Stojan okupiĝas ankaŭ pri Bibliografia Servo, kaj ke la biblioteko estis la kialo ke oni kreis tiun servon, kiu sisteme registru ĉiujn verkojn en Esperanto kaj helpu al personoj kiuj interesiĝas pri esperanta literaturo. [32](#) Tamen ŝajne daŭris sufiĉe multe da tempo, ĝis oni realigis tion. Laŭ la Jarlibro en 1929 ĝi senpage informu pri verkoj el la Esperanto-literaturo kontraŭ repago de la afranko. Oni nomas la kolekton «plej riĉa», havanta ĉiujn verkojn en kaj pri Esperanto, pri la problemoj de internacia lingvo kaj pri la diversaj planlingvoj. La gazetaro estas kompleta, UEA aĉetas kaj interŝanĝas bibliotekaĵojn. [33](#)

En la sekva jaro 1930 la Jarlibro iomete reprenas sian oferton: oni ne povas garantii sendi informon, kaj «specialaj laboroj bibliografiaj» eblas nur laŭ interkonsento pri honorario. Oni mencias la *Bibliografion de Internacia Lingvo* de Stojan. [34](#) Tiu verko el 1929 estis iniciatita de Direktoro Hans Jakob, kaj baziĝas parte jam sur la sliparo de la UEA-biblioteko el 1925/26. Stojan mem komencis en aŭgusto 1927 tiun gravan bibliografion, financitan interalie de Alice Vanderbilt Morris, honora sekretario de *International Auxiliary Language Association*. [35](#) Nur pro tiu subteno de s-ino Morris fariĝis ebla la biblioteka posteno de Stojan.

Dum la venontaj jaroj la Jarlibro denove silentis pri la Servo, sed en la gazeto *Esperanto* oni tamen ankoraŭ havis Bibliografian Servon, kiu estis rubriko kiel la nuntempa *Laste aperis*, kun priskribo de mendeblaj novaperaĵoj. Tiam pro la krizo en kaj ĉirkaŭ UEA ĉesis ĉia laboro en la biblioteko, kiu havis pli ol 9.000 enskribitajn objektojn. [36](#) Artikolo el tiu tempo donas ekzemplon pri la laborego kiun kaŭzis la biblioteko: «Preparante jarkolektojn por bindado, ofte oni konstatas ke mankas unu-du kajeroj, aŭ kelkaj el ili estas difektitaj. La jarkolekto do formetiĝas por atendi kelkajn semajnojn aŭ monatojn, ĝis oni rehavigos mankaĵon. Iufoje pasas unu jaro en tia atendado, korespondado, eĉ anoncado pri mankantaj numeroj.» [37](#)

La CO translokiĝis en aŭgusto 1929 al la adreso Tour de l' Isle, kaj la biblioteko transportita en cent grandaj kestoj ricevis en la turo vastan ĉambron, «kun balkono kies muro montras la ciferplaton de la horloĝo».

³⁸ Tiu ĉambro estis kvarangula, laŭ direktoro Jakob kvazaŭ speciale kreita por ĝi, kun grandaj belaj murŝrankoj, kun ĉiuj nebinditaj materialoj en sepcent fermitaj karton-kestoj. Cetere oni povis akcepti gastojn tie. ³⁹

B. Svis-brita periodo

1. Stokholmo 1934 kaj la sekvoj

La turmentaj 1930-aj jaroj estis konflikto-riĉaj ankaŭ interne de la esperantistaro. En 1933 la partoprenintoj de la Universala Kongreso de Esperanto forlasis Kolonjon kun la kredo, ke fine la solvo de la multjara disputo pri internacia organizo estas trovita: integrado de la landaj asocioj en la tutmondan asocion. Ili restis memstaraj, sed pagis certan kontribuon al la UEA-elspezoj por laboroj utilaj al la tuta movado. La nova statuto (januaro 1934) donis al la Biblioteko de UEA multe da spaco kaj starigis la eblon de pruntedona servo, kiu tamen neniam ekfunkciis. Sed la kongreso de 1934, kiam oni en Stokholmo elektis novan Estraron, alportis grandan skandalon kaj la ĝermon por la posta «skismo» de 1936 ĝis 1947. Dum la kongreso de Stokholmo Stettler kaj Direktoro Jakob forlasis la postenojn. La biblioteko tiam orfiĝis, la ordigado kaj registrado de la titoloj estis haltigitaj jam en 1933. [40](#) Novaj libroj estis metitaj en kestojn laŭ jaro.

Pro la relative altaj kostoj en Ĝenevo, la Estraro publikigis en marto 1936 la planon transloki la oficejon al Londono, ĉar Britio havis pli favoran valuto-politikon. La biblioteko logike akompanu la oficejon, UEA-prezidanto Louis Bastien klarigis, sed Brita Esperanto-Asocio en Londono posedas pli-malpli la saman kolekton, kaj ne estas prudente havi ambaŭ bibliotekojn en la sama loko. Venis propono de Hugo Steiner, UEA-estrarano kaj samtempe direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) en Vieno, kiu siaflanke apartenis al la Aŭstria Nacia Biblioteko. La muzeo povus transpreni la librojn el Ĝenevo, laŭ jenaj kondiĉoj: la Biblioteko de UEA fariĝu «parto» de la Nacia Biblioteko kaj submetiĝu al ties reguloj, sed estu en «apartaj ejoj». Librojam havataj en Vieno restos je la dispono de la Asocio. La eniro estu senpaga, kaj se la Nacia Biblioteko ial ne plu povos aŭ volos konservi la librojn, tiam ili reiru al UEA. [41](#)

En cirkulero al la komitatanoj, de la 30-a de aprilo 1936, Bastien aldonis sciigon de la Svisa Esperanto-Societo ke ĝi donacis parton de la nuna

Biblioteko de UEA kiun oni ne rajtas movi el Svislando. Li anoncis ke li enketos pri la afero, kio estos malfacila ĉar ne troveblis inventaro en la senco de katalogo, do por ke oni povu vidi kiuj libroj apartenas al UEA, kiuj estas nur deponaĵo ktp. ⁴² Somere dum la kongreso de Vieno, Lidia Zamenhof plendis kontraŭ la donaco de la biblioteko al IEM. Bastien respondis ke la parto donacita de la svisoj restu en Svislando, sed ke oni fordonos la reston, ĉar oni ne plu havas monon por konservi ĝin. ⁴³ Hans Jakob kaj aliaj svisoj tamen post 1936 ne revenis al la aserto ke la iamaj SEB-libroj devus resti en la lando, ili ŝajne ne povis pruvi ke SEB vendis la kolekton al Hodler vere sub tiu kondiĉo. En 1961 eksprezidanto Edmond Privat ne aludis tian malpermeson, kiam li rekomendis al UEA forpreni la bibliotekon al Roterdamo. Aliflanke, Hans Jakob en 1936 post ekscio pri la londonaj planoj ja opiniis ke la Biblioteko de UEA «formas integran parton de la organizaĵo» kaj estu ĉe la oficejo, ke ĝi sekve akompanu la sidejon. ⁴⁴

Por transloki la oficejon oni bezonis ŝanĝon de la statuto kaj por tio la Ĝeneralan Voĉdonon de la Delegitoj, do de lokaj UEA-funkciuloj kun specialaj devoj kaj rajtoj. Kvankam la Estrara plano estis aprobita, kvin svisaj membroj komencis proceson kontraŭ la translokado, kio fariĝis la granda temo dum la Universala Kongreso de Vieno en somero 1936. Fine letero el Svislando montris, ke Jakob kaj aliaj svisoj daŭrigos la proceson, kio lamigos la laboron de UEA almenaŭ dum pluraj monatoj. Post nesukcesaj provoj de repacigo, post septembro 1936 la granda plimulto de la membroj kaj aligitaj asocioj sekvis la Estraron al nove fondita Internacia Esperanto-Ligo, IEL. Kelkajn monatojn ĝia sidejo situis en Londono ĉe Brita Esperanto-Asocio, antaŭ ol oni funkciigis domon en Heronsgate apud Londono, surprize donacitan de gesinjoroj Dinslage.

La statuto de IEL el 1937 mencias nur arĥivejon, ĉar la biblioteko restis ja en Ĝenevo. Antaŭe oni bezonis bibliotekon kiu kolektis librojn alvenintajn por la gazeto, dum iu tempo ankaŭ por la libroservo, sed de 1936 ĝis 1940 la du oficialaj IEL-organoj *Esperanto Internacia* kaj *Heroldo* estis ambaŭ redaktataj de Teo Jung en Nederlando. Kaj dum la dua mondmilito ne aperis multaj libroj, ekzemple en 1944 laŭ nuna BHH 23, inter ili nur du binditaj.

La ŝrumpinta «ĝeneva» UEA orfiĝis, sed provizora komitato transprenis la gvidadon kaj reinstalis Hans Jakob kiel direktoron. Ekde 1937 oni

ricevis novan sidejon en Palais Wilson, domo en kiu rezidis diversaj internaciaj organizaĵoj. Post kiam komenciĝis la dua mondmilito, Jakob timis ke la germana armeo ne haltos je la landlimo kiun Ĝenevo havas kun Francio. En aprilo 1940 li petis Alice V. Morris enketi ĉe usonaj publikaj bibliotekoj ĉu eblas akcepti la Bibliotekon de UEA. Leteroj de la ĉefoj de la *Congress Library* kaj la publika biblioteko de Novjorko montras klaran interesiĝon, sed problemo restis la kostoj por transporto kaj asekuro. Dume, en majo kaj junio Francio estis konkerita de Germanio, kaj transporto de la biblioteko el Ĝenevo ŝajnis entute neebla. [45](#)

La jaro 1942 alportis finon al la funkciado de UEA, sed Jakob trovis laborpostenon en ŝtata oficejo. La kantono Ĝenevo estis transpreninta Palais Wilson, tiel ke li laboris nun por la ŝtato – hazarde en sia malnova ĉambro. La internaciaj organizaĵoj iris al alia konstruaĵo, kaj la saman sorton atendis ankaŭ UEA. Jakob esperis ricevi vastajn ĉambrojn, je malgrandaj kostoj, en konstruaĵo en nobla kvartalo. [46](#) Tamen en novembro 1942 li skribis al UEA-prezidanto Kürsteiner ke la Esperanto-oficejo restos en Palais Wilson, kaj ke ankaŭ ne necesas transloki la jam enpakitan bibliotekan materialon al alia etaĝo. Tion li bonvenigis, ĉar oni tiel ŝparas kaj transportkostojn kaj lupagojn. Li antaŭvidis ke oni aŭ pagos nenion aŭ nur tre malmulte, kaj tamen konservos la luksan adreson Palais Wilson. [47](#)

2. Serva Centro en Ĝenevo

Internacia Esperanto-Ligo malgraŭ ĉiuj problemoj relative bone travivis la duan mondmiliton. Dum kunveno en julio 1946 en Berno, la reprezentantoj de IEL kaj UEA-Ĝenevo interkonsentis ke ambaŭ asocioj kunfandiĝu. La Centra Oficejo en Herongate apud Londono fariĝu Administra Centro, dum la oficejo en Ĝenevo ricevis la nomon Serva Centro. Tie Hans Jakob, nova redaktoro de la komuna asocia organo *Esperanto*, prizorgu la bibliotekon kaj novan Bibliografian Servon, registradu la aperintajn verkojn, preparu bibliografian informaron kiel jam ĝis 1933, kaj kolektu ĉiujn dokumentojn pri Esperanto. «Sub certaj kondiĉoj» oni ankaŭ pruntu librojn. Krome oni invitis eldonistojn sendi po unu ekzempleron de siaj eldonaĵoj al la Bibliografia Servo. ⁴⁸ Tiu ĉi solvo pri la sideja demando fakte estis proponita de IEL jam en 1937 dum la kongreso en Varsovio, ⁴⁹ ĉar la IEL-estroj volis respekti la dezirojn de Jakob precipe rilate al la biblioteko.

La interezoj de la restinta hodlera kapitalo pagu la luon por la havaĵoj (dokumentoj, biblioteko) en Ĝenevo. Se tio ne sufiĉas, tiel estis la interkonsento, la Administra Centro en Herongate pagos la ceteron ĝis entute mil svisaj frankoj. ⁵⁰ Jakob komentos poste en 1960, ke la hoderkapitalaj interezoj kovris nur la luon por Palais Wilson. ⁵¹

En la origina propono pri nova statuto, kiun akceptis la IEL-Komitato, ankoraŭ mankis la biblioteko. Nur post modifoj proponitaj de UEA-Ĝenevo, la 14-an de aprilo 1947, la Biblioteko de UEA aperis. En aŭgusto 1948 ĝi ricevis la laŭstatutan nomon «H. Hodler», ekde la statuto de 1980 ĝi nomiĝas Biblioteko Hector Hodler.

La biblioteko en Palais Wilson restis malfacile alirebla. Tial ĝi apenaŭ ludis rolon en *Esperanto*, kvankam Hans Jakob estis de 1947 ĝis 1955 la redaktoro, dum kelke da tempe kun helpredaktoro en Anglio. Sed aperadis la mencioj, kiuj libroj atingis la redakcion. Nur ekde 1952 oni eksciis pli pri la biblioteko el la jar-raportoj de la Estraro. En 1954 Jakob anoncis modernigon de la slipa katalogo, en 1955 li informis ke kelkmil objektoj en kartonaj kestoj atendas prilaboron. Aro da esperantistoj volontule rekopias la tutan sliparon de 15.000 kartoĵoj. Kiam tio estos preta

post unu jaro, tiam oni povas esperi pri pli inda ejo por la biblioteko. [52](#)

Tiu espero rilatis al – ne unuanima – estrara decido de Pasko 1954, transloki la Centran Oficejon de la vilao en Heronsgate apud Londono al la urbego Londono mem, [53](#) sed tie ne troveblis sufiĉe malmultekosta ejo. El Londono fariĝis Roterdamo, kie oni trovis hejmon almenaŭ por iom da tempo: Oni jam sciis ke la domo de Eendrachtsweg 7 estas malkonstruota. Sed en Roterdamo loĝis Marianne H. Vermaas (1911-91), Nieuwe Binnenweg 70, apude de la nova ejo, kaj en la kongreso de Bolonjo en 1955 fariĝis klare ke ŝi estos la nova oficejestrino. En novembro 1955 la Centra Oficejo fine translokiĝis, sub la gvido de Vermaas, kiu jam estris la laborojn en Heronsgate dum la lasta monato.

La biblioteko restis «granda zorgo» de la Serva Centro en Ĝenevo, Jakob jar-raportis por 1955/56. La libroj stokiĝis en «ejo nealirebla, pli precize en deponejo», kaj serĉindis loko «digna, ampleksa kaj malmultekosta». [54](#)

En inventaro de la 21-a de majo 1956 li nomis partojn de la Serva Centro en sia loĝejo: kverkan ŝrankon kun tirkestoj, malnovegan abian ŝrankon, du kverkajn tablojn kaj tri oficejajn seĝojn. La valoron li taksis je cent sesdek frankoj. En la kvina etaĝo de la Palais Wilson estis biblioteka breto, meblo por klasifikado, du malnovaj seĝoj kaj du ordinaraĵoj, kvarfaka sliparejo, du murŝrankoj kun vitro, por ekspozicio, kaj malnova skribmaŝino. Sume temas pri valoro de 215 frankoj. Sub Biblioteko mem li listigis: proks. mil diversformataj skatoloj kun naŭmil enskribitaj objektoj; cent dudek grandaj skatoloj kun neklasitaj libroj de post 1933; ducent rezervaj skatoloj, proks. ducent skatoloj da neklasigitaj periodaĵoj de 1933-56, sesdek skatoloj kun pli ol mil preskliŝoj «zorge enpakitaj sed ne sisteme ordigitaj». Krome li menciis amason da dokumentoj, gvidfolioj, nevendeblaj «ŝlosiloj» (mallongaj nacilingvaj priskriboj de la lingvo Esperanto por varboceloj), oficeja ilaro, stampiloj; la «skribtablo amerika» de Hector Hodler, donaco de la vidvino. [55](#)

En la 1950-aj jaroj sub la nomo de UEA kreiĝis du institucioj, kies rezultoj poste iris al Roterdamo. Ivo Lapenna (1909-87) en 1951 fondis Centron de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, kiu ekfunkciis la 1-an de januaro 1952. Ĝi celis produkti sciencajn esplorojn pri la internacia lingvo el lingva, sociologia, psikologia kaj politika

vidpunkto, kolekti dokumentojn rilate al Esperanto, kaj kontribui al informado. ⁵⁶ De 1951 ĝis 1974 la edzino Ljuba Lapenna laboris kiel sekretario de CED. Post kiam la honorofica direktoro Ivo Lapenna forlasis la Asocion en 1974, la arkivoj de CED venis al la Centra Oficejo en Roterdamo. Tiam Lapenna resume raportis pri 396 eldonitaj (kutime multobligitaj) dokumentoj en diversaj lingvoj; la tuta arkivo laŭ li konsistis el 4 525 kolektitaj dokumentoj, ⁵⁷ ofte gazetoj, gazeteroj aŭ folioj kun rilato al Esperanto aŭ lingvaj demandoj. Krono de la CED-agado estis «Esperanto en perspektivo», aperinta en 1974 en tri mil ekzempleroj. Nova direktoro post la demisio de Lapenna fariĝis Jonathan Pool el Usono.

En aprilo 1957 Rüdiger Eichholz fondis en Kanado la Magnetofonan Servon de UEA, por kiu li registris ofte en Esperanto-renkontiĝoj kaj mem produktis programojn por klubaj vesperoj. ⁵⁸ La sonbendoj atingis la Centran Oficejon en 1998.

3. La kazo Jakob

Hans Jakob servis al Universala Esperanto-Asocio dum preskaŭ kvindek jaroj, kun interrompoj. Tamen, kiam li mortis en 1967 la revuo *Esperanto* publikigis nur dek kvar sobrajn liniojn, ⁵⁹ kaj nuntempe li estas preskaŭ forgesita. ⁶⁰ Jakob, origine komercisto kaj havanta grandan privatan bibliotekon, ⁶¹ estis ĝis 1934 direktoro kaj revenis al tiu posteno post la «skismo» de 1936. En 1947 li transiris de la Estraro de la ĝeneva UEA al tiu de la nova, kunfandita Asocio. Nur pro Jakob la Asocio konservis centron en Ĝenevo, kiun li oficiale gvidis honorofice, do sensalajre. Estrarano kaj krome redaktanto de la revuo *Esperanto* li restis ĝis 1955, kiam li ricevis la titolon *honora redaktoro*, kaj al la Komitato li apartenis ĝis 1961.

Dum Hans Jakob estis estimata de multaj esperantistoj pro siaj meritoj, ne nur de malnovaj amikoj el la tempo de la skismo, la Estraro spertis daŭre malfacilaĵojn kun li. Ĝi opiniis ke la biblioteko iru tien, kie ĝi estas uzebla, ke en la nova oficejo en Roterdamo estas sufiĉe da spaco. Sed Jakob «ne respondis al tiukoncernaj leteroj de la prezidanto», oni legas en la protokolo de estrarkunveno de decembro 1955. ⁶²

La ripetataj postuloj de la Estraro ne havis sekvon. En la UK 1956 en Kopenhago eĉ la Komitato decidis ke la biblioteko iru al la sidejo, nun situanta en «la centro de grava urbo, kiu povas esti facile vizitata de samideanoj kaj eksteruloj». Principe, la libroj estu utiligataj surloke, sed la Estraro fiksu regularon por pruntedono de libroj, nur por seriozaj studoj kaj sub la garantio de la Landaj Asocioj. Valoraj libroj tute ne estu pruntedonataj. La raportoj de la koncernaj komisionoj eksplicite rekonas la meritojn de Jakob, «kiu tiel bone kaj lerte konservis kaj savis la bibliotekon dum la milito», sed mencias ankaŭ «traktadojn», kiujn oni daŭrigu kun Jakob. ⁶³

Malgraŭ la evidenta malemo de Jakob doni la bibliotekon el siaj manoj, ŝajnas ke la ĝenevano tamen havis problemon pro la granda kvanto de materialoj: Laŭ la estrara raporto por 1956/57 li petis ke Roterdamo transprenu kelkajn partojn de la biblioteko, ĉar ĝi estas ŝarĝa zorg-infano por li, ankaŭ finance. Jakob esprimis la esperon ke en Roterdamo oni

povos daŭrigi la kolektadon kaj registradon, ⁶⁴ komencitan laŭ li jam en Ĝenevo kun la helpo de volontuloj. En 1957 li antaŭvidis grandan librosendon al Nederlando por 1958, nome de la objektoj de antaŭ 1933, kiuj troviĝis jam binditaj aŭ en bibliotekaj skatoloj, proksimume tridek kvin kestegoj, 80 oble 80 oble 60 cm, pezantaj entute mil okcent kilogramojn. Laŭ aldona rimarko al la jara raporto de 1958/59, la Estraro decidis denove ke ĉio iru Roterdamen, kie estas spaco kaj kie eblas ĝin bone ordigi. ⁶⁵ Nur ekde 1960 la mistero Jakob fariĝis pli klara.

Jakob kiel prizorganto de la Serva Centro en Ĝenevo havis ĉiujare sufiĉe longan liston de spezoj, kiuj ekde la komenco de 1960 estis pli severe kontrolitaj. La profesia reviziisto B. C. Storm havis la taskon pretigi bilancon pri la tuta Asocio kaj konstatis malĝustaĵojn en la kalkulado por la Serva Centro. Jakob poste liveris entute ses malsamajn versiojn de la jarkalkulo 1959 kaj dume konfesis ke li vendis akciojn sen la scio de la Estraro. Li estis ŝovinta la monon inter pluraj kontoj kaj rezulte deprenis tri mil frankojn por si mem. ⁶⁶

Unu el la antaŭaj kontrolantoj estis poste petita klarigi al svisa esplorjuĝisto, kiel aspektis kontrolado de la Jakob-spezoj antaŭe. Li raportis letere ke iam dum paŭzo en svisa Esperanto-rekontiĝo Jakob petis lin kaj du aliajn personojn kontroli la spezojn. La kontrolanto koncedis en sia letero ke ili eble ne havis sufiĉe da tempo kaj ne estis sufiĉe preparitaj. Sed ĉar «sinjoro Jakob kiel longjara direktoro kaj redaktoro de UEA estis tre admirata inter la esperantistoj de Svislando, ni sekve donis al li fidon laŭ tio. Estas tre embarase por mi devi konfirmi, ke mi nuntempe rifuzus revizori je tiaj kondiĉoj». ⁶⁷

Oni trovis pli ol unu strangaĵon en la asertitaj elspezoj. La financ-revizoro Evert Jan Woessink, ekde aŭgusto 1960 estrarano pri financoj, provis kolekti la havaĵojn de UEA kaj havis almenaŭ parte sukceson. Pluraj el liaj akuzoj, esprimitaj interalie en 1964 antaŭ juĝisto kaj ankaŭ priskribitaj en speciala estrara raporto en 1965, rilatas rekte al la biblioteko.

Hans Jakob estis asertinta ke li elspezis en la periodo 1955-59 entute mil tricent svisajn frankojn kiel lupagon al la ĝeneva departemento pri publika transporto, por la spaco en Palais Wilson por la biblioteko. Woessink eltrovis ke la Asocio fakte ne pagis al la departemento, sed al iu sinjoro Ammann kiel prizorganto de Palais Wilson. Jakob jen klarigis ke en 1942

la pedelo Ammann ekdisponigis parton de sia laborloko, kiun Jakob uzis kiel arkivejon. La monon li donis al Ammann pro etaj manlaboroj kaj la sindevigo, informi al Jakob kiam venas esperantistoj por viziti la ĝenevan oficejon. Woessink ne akceptis tiun klarigon. La Komitato de UEA ĉiam kredis ke ja okazas lupago al Palais Wilson por la biblioteko, sed Woessink vizitis respondeculon de tiu ĝeneva departemento, kaj tiu klarigis ke la kantono Ĝenevo ne rajtas ludoni ĉambrojn en tiu domo. Kiam la estrarano montris al la respondeculo la kvitancojn laŭ kiuj sinjoro Ammann ricevis monon kiel lupagon, la respondeculo estis tre mirigita. Woessink dubis ĉu Ammann iam ajn faris iujn manlaboretojn por UEA. Tiam, en oktobro 1960, Woessink, Lapenna kaj Vermaas en Ĝenevo konstatis ke la urbo disponigis ekde 1947 aŭ 1948 la kelon por la UEA-biblioteko *senpage*. Ankoraŭ en junio 1960 Jakob estis krediginta al Woessink ke UEA pagadis por ĝi tricent frankojn jare. ⁶⁸ Woessink priskribis ke en la kelo de Palais Wilson troviĝas interalie proksimume kvindek skatoloj numeritaj kun enhavo en kovertoj, laŭ Jakob temis pri libroj kiujn li persone estis ricevinta kiel donacojn. La kelo havis grandecon de proksimume dek oble kvar metroj kun tiom multe da paperoj, libroj, gazetoj k.t.p., ke Woessink apenaŭ povis imagi ke ĵus antaŭe tie estis krome la 38 kestoj kun du mil kvincent kilogramoj senditaj jam al Roterdamo. En la kelo estis proksimume tridek paketoj da kliŝoj, dek grandaj kaslibroj, skatoloj kun «ŝlosiloj» en diversaj lingvoj, kaj korespondaĵoj. Tiuj aferoj kuŝis sur lignaj bretoj, tamen ekzistis ankaŭ unu granda meblo kun proksimume tridek tirkestoj. Supre en Palais Wilson en malpura malgranda ĉambro, unu oble kvar metroj, estis unu sufiĉe bona ŝranko kun tirkestoj, kiuj enhavis libretojn. Hejme Jakob havis multege da libroj kaj, en skatoloj starantaj sur tablo en la laborĉambro, materialon por esperantista biografio *Kiu estas Kiu*. ⁶⁹ En tiu jaro Woessink eniris la loĝejon de Jakob, helpe de la polico, kaj kunportis dokumentojn, kvindek librojn kaj kelkajn broŝurojn de proksimume cent kilogramoj. ⁷⁰ Jakob estis menciinta en sia spezialisto sumon por presigi slipojn por la biblioteko kaj por ordiga laboro fare de iu sinjorino Comte. En kunsido antaŭ juĝisto, en 1964, Jakob konsentis transpreni la pagon al la sinjorino, konfesante ke li ankoraŭ havas la sliparon de la biblioteko. Li akceptis ke ĝi estas proprietaĵo de UEA kaj anoncis doni ĝin post la fino de la proceso. Woessink siaflanke akceptis pagi la presitajn slipojn, kondiĉe ke la sliparo vere iros al UEA. ⁷¹

La nervomalsana 73-jara Jakob ne plu havis ĉiujn el siaj mensaj fortoj. Dum UEA preferis solvi la konflikton malantaŭ la kulisoj, Jakob mem interalie en oktobro 1965 publikigis pamfleton en kiu li kulpigis aktivulojn de UEA pro kalumnioj. La Estraro respondis per broŝuro «por interna uzo» kiu listigis la ŝuldojn de Jakob. Tie la Estraro repostulis ankaŭ du mil svisajn frankojn por libroj el la Biblioteko de UEA, kiujn Jakob vendis laŭ letero el 1950 al iu Glenn P. Turner en Madison, Wisconsin; Jakob ne informis pri la vendo la Estraron (kiu ne estus konsentinta) kaj ankaŭ neniam enskribis la gajnon en la kaslibron de la Serva Centro. ⁷² Jakob en sia reago rifuzis la riproĉon: laŭ li, iam dum la milito Turner petis lin pri libroj por krei publikan Esperanto-bibliotekon. Jakob utiligis la okazon por seniĝi je duoblaĵoj. Per la ricevitaj kvincent dolaroj li subtenis esperantistojn en Germanio kaj Ĉeĥoslovakio. ⁷³ En la Arkivo de UEA ankoraŭ ekzistas la dosiero, kiun Jakob siatempe faris por la korespondado kun Turner. Evidente temas pri la jaroj 1948 ĝis 1950, kaj Jakob kredigis al Turner ke li agas tute oficiale, eĉ proponis meti en ĉiun libron stampon indikantan ke UEA cedis ĝin. Estante mem estrarano Jakob eble ne devis konsulti la kolegojn pri vendoj, sed ĉiukaze li devis raporti pri la enspezoj, per la koncernaj kasdokumentoj. Ankaŭ tiuj estas trovitaj en Roterdamo, kaj kiel vendo-enspezoj aperas tiujare nur 183 frankoj ĉefe por brokantaĵoj venditaj al Svedio. ⁷⁴

La Asocio kalkulis tiam en 1965 ke Jakob ŝuldas al ĝi ĉ. tridek mil svisajn frankojn, sed postulis pro diversaj indulgoj nur dudek mil. ⁷⁵ Tio respondis al tiutempa jara enspezo de averaĝa mastrumo en Svislando, estis do ankoraŭ tre granda sumo por la emerita diabetulo. ⁷⁶ La estrara raporto de 1968/69 sciigis ke post la morto de Jakob, en oktobro 1967, liaj ŝuldoj pli grandis ol liaj havaĵoj, kaj fine la Asocio ricevis 3 578,40 frankojn. ⁷⁷

La dua parto de la biblioteko, el la jaroj post 1933, kaj aliaj dokumentoj restis post somero 1960 ankoraŭ en la kelo de Palais Wilson kaj en la hejmo de Jakob. Fine de 1961 CO-direktorino Vermaas raportis al la ĝenerala sekretario Lapenna ke grandŝance baldaŭ venos tiu materialo, danke al la delegito Walter Sonderegger el Zuriko. Sonderegger estis vizitinta Hans Jakob en ties hejmo kaj kredigis ke li venis proprainiciate kaj sen ĉiuj informoj. Post dutaga amikeca interparolado Jakob vizitis kun li la kelon en Palais Wilson. La zurikano do eksciis ke Jakob, malgraŭ alia aserto, ja rajtis eniri la kelon, faris tion regule, kaj havis eĉ propran

ŝlosilon. Cetere Sonderegger konstatis ke Jakob, kvankam li postulis monon de UEA por dungi enpakiston, havis la intencon mem fari la enpakadon. ⁷⁸ En aprilo, majo kaj junio 1962 Woessink vizitis Ĝenevon denove por antaŭenigi la aferon. Jen Jakob subskribis deklaron ke li pretas transdoni la posedaĵon de UEA. La nova estro de la Serva Centro, Johannes Jakob Sturzenegger, tuj poste helpe de aliaj svisaj esperantistoj pakis tridek kvin plenajn kestojn, kiuj atingis Roterdamon en julio. Tamen restis materialoj kaj mebloj de UEA en la hejmo de Jakob, laŭ la estrara raporto. ⁷⁹ Kvankam al Jakob estis malpermesite eniri la kelon de Palais Wilson, li tamen trovis manieron fari tion, kaj li havis okazon forpreni aferojn laŭplaĉe, raportis Woessink ankoraŭ en 1964. ⁸⁰

Kiam Jakob mortis en 1967, venis plia materialo de Svislando al Nederlando, «unuavice pri Volapük k.a. projektoj». ⁸¹ En la kontaktoj de Woessink kun la filino de Jakob la biblioteko mem ŝajne ne ludis rolon. ⁸² Estas malfacile direble, kiam venis kiu materialo al Nederlando. Claude Gacond de la Centro pri Esploro kaj Dokumentado de la Lingvo Internacia (CDELI), en la okcidentsvisa urbeto La Chaux-de-Fonds, klarigas en sia historio de tiu Centro ke la filino de Jakob pro la minacantaj ŝuldoj ne akceptis la heredaĵon, kiu sekve estis aŭkcota de la ŝtato, kaj li priskribas sub kiuj malfacilaĵoj li fine sukcesis savi la arkivojn de Jakob por CDELI, precipe dokumentadon kunmetitan de Jakob pri diversaj planlingvaj projektoj, ankaŭ antikvajn librojn. ⁸³

La sorto de tiu sliparo, farita laŭ Jakob en la 1950-aj jaroj por la novaĵoj post 1933, ne estas konata, ĝi troviĝas nek en BHH nek en CDELI. Eble la asertata katalogado nur servis kiel preteksto teni la librojn en Palais Wilson kaj ricevadi la «lupagon».

C. Nederlanda periodo

1. Translokado kaj ekfunkciigo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

2. Iniciatoj post 1974

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

3. BHH en 2006

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Kroniko por superrigardo

Svisa Esperanta Societo

1903: Fondiĝas Svisa Esperanta Societo, ĉe kiu kolektiĝas libroj kaj periodaĵoj.

1908: La svisa societo fondas Bibliotekan Komitaton por Svisa Esperanto-Biblioteko.

1909: La biblioteko translokiĝas grandparte al Ĝenevo. Bibliotekisto Stettler proponas ĝin al UEA.

Hector Hodler kaj UEA, Ĝenevo

1912: Hector Hodler transprenas la kolekton. Ĝi ricevas la nomon Universala Esperantia Biblioteko.

1913: Hans Jakob venas al Ĝenevo kaj ekprizorgas la kolekton por Hodler.

1919: La oficejo situas en Berno (ĝis 1920).

1920: Hodler postlasas ĝin al UEA. La Biblioteko de UEA ricevas unuafoje mencion en la Statuto.

1926-30: Pri la biblioteko zorgas Petro Stojan.

1931-33: Transprenas tiun zorgadon Henri Vatr .

1929: Kun la oficejo la biblioteko iras al Tour de l'Isle.

1936: En marto la Estraro decidas translokigon de la oficejo al Ĝenevo

kaj la bibliotekon al Vieno. Proceso ekigita de Jakob malebligas tion.

1937: Oficejo kaj biblioteko iras al Palais Wilson.

1942: Jakob trovas tie spacon por la kolekto, je favoraj kondiĉoj.

1946: En la Interkonsento de Berno la biblioteko estas fiksita kiel tasko de la Serva Centro en Ĝenevo.

Serva Centro de UEA, Ĝenevo

1947: Jakob trovas senpagan spacon por la kolekto. Post la kunfandiĝo de UEA kaj IEL la Biblioteko de UEA aperas en la Statuto-proponoj.

1948: En la nova Statuto la biblioteko ricevas la nomon «H. Hodler».

1954: La Estraro esprimas la deziron ke la biblioteko estu ĉe la Centra Oficejo.

1956: En Kopenhago la Komitato decidas ke la biblioteko estu en la nova oficejo en Roterdamo.

Centra Oficejo, Roterdamo

1960: La financaj trompoj de Jakob fariĝas konataj. La unua livero da libroj alvenas en Roterdamo.

1962: La Centra Oficejo translokiĝas al la nuna adreso Nieuwe Binnenweg 176. La dua livero da libroj alvenas en Roterdamo. Victor Sadler estas nomita bibliotekisto.

1967: Jakob mortas, pliaj libroj atingas Roterdamon.

1969: La oficejo ricevas fotokopiilon. Ekdeĵoras Robert Moerbeek. Instalado de Fondaĵo Biblioteko, ĝis proks. 1974.

1980: En la nova Statuto la kolekto ricevas sian nunan nomon: Biblioteko Hector Hodler.

1987: Roger Blaine volontulas en la biblioteko.

1990/91: Robert Keetlaer, anstataŭanta militservon, entreprenas paŝojn por komputila registrado.

1991: Instalado de nova Fondaĵo Biblioteko.

1994: Bart Ruigrok registras periodaĵojn (ĝis 2002).

1996: Libroservisto Simo Milojević speciale atentigas ankaŭ la bibliotekon.

1998: Alvenas la sonbendoj de la Magnetofona Servo de Rüdiger Eichholz el Kanado.

2003: Ziko van Dijk faras raporton pri stato kaj eventualaj estontecoj de BHH; ordigoj fare de li, precipe en la Arkivo.

2006: Translokiĝo de la libroj kaj revuoj al novaj rulbretaroj en Salono Zamenhof.

El la UEA-statutoj

Regularo 1908 kaj Statuto 1910 ne mencias bibliotekon aŭ arĥivon.

Statuto 1920

«42. [...] La Centra Oficejo konservas la bibliotekon kaj arĥivejon de la asocio.»

«44. [...] La Redaktoro klopodas gajni kunlaborantojn, prefere senpagajn, kaj korespondas kun ili. Por la parto de li redaktita, li portas la leĝan respondecon. El ĉiuj alsenditaj presaĵoj la unua ekzemplero apartenas al la biblioteko de UEA, la aliaj al la Redaktoro aŭ la kunlaborantoj.»

Statutpropono 1922 (William Page)

«XVIII. [...] En la Centra Propagandejo estas konservataj la arkivoj de la Esperanta movado kaj la oficiala biblioteko.»

Statuto 1934

«48. Se estas du Direktoroj, tiam unu havas la titolon:

Direktoro de la Internaj Aferoj, kaj la alia la titolon:

Direktoro de la Eksteraj Aferoj. [...]

Kiel *Internaj Aferoj* estas konsiderataj: [...] Plie la oficiala bulteno, la administro de la revuo kaj biblioteko, la aranĝoj pri kaj interne de la oficejo.»

«50. La Biblioteko de UEA kolektas ĉiujn konservindajn esperantlingvajn presaĵojn, kaj interesajn verkojn en kaj pri lingvoj internaciaj. Ĝi akiras ilin laŭeble el redakciaj ekzempleroj, donacoj kaj interŝanĝoj. Por la biblioteko kaj por materialo de Esperanto-ekspozicioj estu rezervata modesta kredito en la budĝeto. Tiom kiom la Centra Oficejo povas okupiĝi pri bibliotekaj aferoj, la aktivaj membroj rajtas pruntepreni materialon kaj librojn laŭ fiksitaj kondiĉoj.

La arĥivejo konservas la ĉefajn organizajn kaj administrajn dokumentojn, plie objektojn kaj leterojn kiuj estas valoraj por la historio de la movado.

51. [...] El ĉiuj alsenditaj presaĵoj [al la redakcio de la gazeto, ZvD] la unua ekzemplero apartenas al la Biblioteko de UEA; la aliaj al la Redaktoro aŭ la kunlaborantoj. [...]»

Statuto de Internacia Esperanto-Ligo 1937

«Arĥivoj.

35. La arĥivejo konservas la ĉefajn organizajn kaj administrajn dokumentojn, plie objektojn kaj leterojn, kiuj estas valoraj por la historio

de la movado.»

Statuto aŭgusto 1948

«38. Biblioteko kaj Arkivejo. La serva oficejo administras la bibliotekon de U.E.A. sub la nomo ‚H. Hodler’. La biblioteko estas je la dispono de interesiĝantoj.

Kun la biblioteko estas ligata la arkivejo de la Asocio, kiu konservas valorajn dokumentojn organizajn, administrajn kaj aliajn, necesajn por la historio dela movado.

La biblioteko de U.E.A. estas registrita en la listo de la specialaj bibliotekoj sub la titolo: Bibliothèque de la Langue Internationale.»

Statuto julio 1955

«38. Biblioteko kaj Arkivo. La Biblioteko de UEA portas la nomon ‚H. Hodler’. Ĝi estas registrita en la listo de la specialigitaj bibliotekoj sub la titolo: Biblioteko de la Internacia Lingvo (Bibliothèque de la Langue Internationale).»

Statutprojekto junio 1978

«43. Biblioteko. La Biblioteko portas la nomon Hector Hodler. La biblioteko disponigas al la membraro de UEA kaj aliaj esplorantoj la ĉefajn verkojn en kaj pri la Internacia Lingvo.»

Statuto 1980

«49. Biblioteko. La Biblioteko de UEA havas la nomon Biblioteko Hector Hodler. Ĝi disponigas, laŭ propra regularo, al la membraro de UEA kaj

aliaj esplorantoj la ĉefajn verkojn en kaj pri la Internacia Lingvo.»

Literaturo

Agricola, Georges [ps. de Hans Jakob]: Biblioteko de UEA, en: EdE 1934, p. 51-52.

Bastien, Louis: Biblioteko de C.O. (Centra Oficejo), en: EdE 1934, p. 50-51.

Bibliografia Servo: La biblioteko de UEA, en: Esperanto, 1929, p. 84/85.

BIL, t. e.: Bibliografia Servo de Universala Esperanto-Asocio: Bibliografio de Internacia Lingvo. Historia sistema katalogo de filologia, lingvistika kaj poliglota literaturo pri universala alfabeto, filozofia gramatiko, signaro, gest-lingvo, pasigrafio, internacia helpa lingvo kaj logistiko, ellaboris kaj komentaris P. E. Stojan, Ĝenevo 1929.

Blaine, Roĝero: Tra densa polvnubo briletas la celo..., en: *Esperanto*, 1987, junio, p. 110/111.

EdE 1934, t. e.: Enciklopedio de Esperanto, Budapeŝto 1934.

EeP 1974, t. e.: Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro: Esperanto en perspektivo, London kaj Rotterdamo 1974.

Eichholz, Rüdiger: Spertiĝu en la parola formo de nia lingvo per helpo de magnetofono!, en: *Esperanto*, 1964, marto, p. 46-48.

Ertl, István: Biblioteko Hector Hodler, en: *Esperanto*, 1992, majo, p. 95.

Estraro de UEA: Estrara Raporto: Universala Esperanto-Asocio en 1994, en: *Esperanto*, 1995, junio, p. 107-116.

— Raporto de la Estraro, en: *Esperanto*, 1976, julio-aŭgusto, p. 117-136.

— Estrara Raporto: Universala Esperanto-Asocio en 1995, en: *Esperanto*, 1996, junio, p. 105-116.

— Kelkaj Historiaj Faktoj pri la Serva Centro de UEA en Ĝenevo. Nur por

interna uzo, Rotterdam 1965.

Fettes, Mark: Per kunlaboro stimuli kunlaboron, en: *Esperanto*, 1989, oktobro, p. 161-163.

— Sur fortiĝanta bazo vastigi la agadon, en: *Esperanto*, 1991, aprilo, p. 61/62.

Gacond, Claude: Rapport historique, La Chaux-de-Fonds 2003 (PDF-datumo).

Gjivoje, Marinko: Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj, Zagreb 1980.

— Manlibro pri Esperanto en bibliotekoj, Zagreb 1978.

Hodler, Hector: Financa reformo de U.E.A., en: *Esperanto*, 1912, 20-a de oktobro, p. 278.

Jagnjić, Ankica: Por registri niajn trezorojn, en: *Esperanto*, 1990, novembro, p. 215.

Jakob, Hans: La Biblioteko de Universala Esperanto-Asocio, 1960, tajpita manuskripto en la Arkivo de UEA.

— La organiza demando, en: V. Bleier / O. Cense: Ora Libro de la Esperanto-movado 1887-1937, Warszawa 1937, p. 122-141.

— Servisto de l' ideo. 50 jaroj ĉe Universala Esperanto-Asocio 1908-1958. Editorado kaj antaŭparolo de Mark Fettes, Antwerpen 1995.

— Universala Esperanto-Asocio: historia skizo, Ĝenevo 1934.

— Vero venkos. Gravaj misprezentoj de S-ro Hans Jakob. Repliko al la verkinto de la pamfleto, supozeble D-ro Ivo Lapenna, en: *Esperanto*. Bulteno de l' Internacia Esperanto-Oficejo de la redakcio de «Enciklopedio de Esperanto» kaj de l' Esperantista Interhelpo, 1966, n-ro 4, p. 1-12.

Lapenna, Ivo: CED, en: *Esperanto*, 1952, januaro, p. 5-6.

Lins, Ulrich: Biblioteko pli kaj pli riĉa, en: *Esperanto*, 1995, julio-aŭgusto, p. 121.

— La nekomprenemaj vidvinoj, en: *Esperanto*, 1975, januaro, p. 5.

— Respondo al malesperaj krioj, en: *Esperanto*, 1991, decembro, p. 225.

McKown, Cornelius J.: Ses esplorcentroj pri interlingvoj, Rotterdam 1981. (Esperanto-Dokumentoj, nova serio, numero 15 E (1981).)

Milojević, Simo: Ses centroj de la Esperanta kulturo, en: *Esperanto*, 1981, novembro, p. 188.

Sadler, Victor: Grava riĉiĝo de la Biblioteko de UEA, en: *Esperanto*, 1963, junio, p. 112.

— La Biblioteko «Hector Hodler», en: *Esperanto*, 1963, majo, p. 85.

— Nova grava akiro por la Biblioteko de UEA, en: *Esperanto*, 1964, januaro, p. 5.

— Savu niajn librojn!, en: *Esperanto*, 1962, oktobro, p. 182.

— Zamenhof-manuskriptoj al Biblioteko «Hodler», en: *Esperanto*, 1972, marto, p. 58.

SEB, t.e.: Svisa Esperanta Biblioteko. Katalogo No 1. Marto, 1909. Oficiala Biblioteko kaj Arĥivejo de la Svisa Esperanta Societo.

Sikosek, Ziko Marcus: A Rotterdam, tout un monde sur papier, en: *Le monde de l'Espéranto*, 2003, marto/aprilo, p. 6-7.

— Aktuala leksikono pri Biblioteko Hector Hodler, en: *Esperanto*, 2003, junio, p. 128/129.

— Simple mankas spaco, en: *La Ondo de Esperanto*, 2003, aprilo, p. 3.

Stettler, Edmund: Hector Hodler. Lia vivo kaj lia verko, Ĝenevo 1928.

Ŝirjaev, I.: Biblioteko de Davidov, en: EdE 1934.

Tonkin, Humphrey: Ĉu Rotterdam estas la ĝusta urbo?, en: *Esperanto*, 1976, majo, p. 85.

— Kion instruas 5000 bibliografieroj?, en: *Esperanto*, 1997, januaro, p. 11.

— Signifa nova iniciato, en: *Esperanto*, 1976, majo, p. 81-83.

Worstznowicz, Eleonora: Enketo pri Esperantaj/Planlingvaj Bibliotekoj, Muzeoj kaj Kolektoj, 1982, tajpita manuskripto (licencia disertacio, Universitato Poznań, proks. 1983; parto kun piednotoj aŭ literaturo mankas).

Kiel nin organizi? La statutoj de UEA

Enkonduko

Asocio povas esti kreita jam nur per la simpla kunagado de homoj; tia unuiĝo povas havi ankaŭ jurajn sekvojn. Sub certaj cirkonstancoj estas saĝe doni al unuiĝo skribitan regularon kaj fine alstrebi juran personecon laŭ ŝtataj leĝoj.

Kvankam la historiaj statutoj de Universala Esperanto-Asocio ne ludas grandan rolon en la kolektiva konscio de la esperantistoj aŭ de la membroj, pluraj gravaj turno-punktoj rilatas al nova statuto. Komentita eldono ne ekzistas, kaj ankaŭ la ĝenerala historiografio pri UEA estas iom magra. Pro tio, la komenca superrigardo en tiu ĉi studeto provas ne nur prezenti la ĉefajn evoluojn en la statutoj, sed ankaŭ rakonte sciigi, laŭnecese, pri la koncernaj estintaj eventoj kaj organizaj strukturoj. Post tiu historia parto unuopaj temoj estos pritraktataj.

A. Historia superrigardo

Universala Esperanto-Asocio estas, laŭ la unua artikolo ¹ de la statuto, fondita en 1947 kiel kunfandiĝo de du pli fruaj organizaĵoj: de la samnoma asocio fondita la 28-an de aprilo 1908 kaj de Internacia Esperanto-Ligo fondita en 1936. Pri la du datoj eblas disputi, ĉar almenaŭ Stettler en 1928 nomis la fondotago ne la 28-an de aprilo 1908, la limdato por la respondoj reagoj al la regularo-propono, sed la 1-an de majo, kiam aperis la unua Oficiala Informilo en la gazeto *Esperanto*. ² Kaj la fama alvoko de Bastien la 18-an de septembro 1936 estis nur unu paŝo en la fondiĝado de Internacia Esperanto-Ligo; ĝia statuto estis akceptita fine en somero 1937.

Pro tiu kunfandiĝo Hector Hodler kaj la nuna prezidanto de UEA en formala senco ne estas membroj de la absolute sama asocio, sed de du malsamaj kun la sama nomo. Historia superrigardo montros ke la literoj U-E-A reprezentas certan longdaŭran kontinuecon de unuiĝo de homoj, sed ke malantaŭ la literoj troviĝis tre diversaj konceptoj kaj strukturoj.

1. Hodlera UEA 1908

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

2. Stetlera UEA 1920

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

3. Nova UEA 1934

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

4. IEL kaj ĝeneva UEA

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

5. Kunfandita UEA ekde 1947

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

6. La ĝenerala solvo de Lapenna

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

7. Diskutoj pri la statuto 1974-80

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

B. Elektitaj problemoj

1. Jura personeco

Por asocio en Nederlando, grava jura fonto estas artikolo 8 de la Konstitucio, kiu garantias ke homoj havas la liberon unuiĝi. Tiu rajto aperis jam en 1848; en 1855 venis leĝo diranta kiel Asocio povas ricevi juran personecon. Se la asocio volis havi ĝin sen tempa limo, tiam la statuto devis esti agnoskita eĉ per leĝo. Tial normale asocioj estis fonditaj por nur 29 jaroj, ĉar tiam sufiĉis reĝa dekreto (pri kiu okupiĝis la ministerio pri internaj aferoj). Ekde 1976 sufiĉas agnosko de la statuto fare de notario. ¹⁵ Jura personeco necesas interalie por ke la Asocio povu aĉeti grundon aŭ ricevi heredaĵojn, sed ĝi ne necesas por la ekzisto de la Asocio entute. Por ke notario akceptu la statuton, asocio devas en ĝi diri sian nomon kaj la urbon kie estas la sidejo, la celon de la asocio, la devojn kiujn la membroj havas al la asocio, la manieron kiel oni kunvokas la ĝeneralan kunvenon de la membroj, la manieron kiel oni nomumas kaj malnomumas la gvidantojn, kaj la uzon de la mono en la kazo de malfondo. ¹⁶

2. Oficiala lingvo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

3. Konsisto kaj membreco

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

4. Unu regno, unu Landa Asocio

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

5. Komitato

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

6. Estraro

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

7. Kompensoj

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

8. Ĝenerala Voĉdonado

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Kiel ni organizis nin

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Literaturo

Estraro de UEA: Kelkaj Historiaj Faktoj pri la Serva Centro de UEA en Ĝenevo. Nur por interna uzo, Rotterdam 1965.

Hamann, Jürgen / Staszczak, Bolesław: Vigla interŝanĝo de opinioj, en: *Esperanto*, 1979, aprilo, p. 61-64.

Jakob, Hans: La internacia organizo esperantista, en: Loka Kongresa Komitato, Warszawa (eld.): Ora Libro de la Esperanto-Movado 1887-1937, red. V. Bleier kaj E. Cense, s.l. 1937, p. 122-141.

Kempeneers, Paul: La rolo de Landaj Asocioj en la Tutmonda Esperanto-Movado, en: *Esperanto*, 1953, julio-aŭgusto, p. 217-219.

Kollen, M. F.: De vereniging in de praktijk, Deventer 1995.

Lapenna, Ivo: Demokrateco kaj memdisciplino en UEA, en: *Esperanto*, 1973, decembro, p. 201-203.

— Distanciĝo, en: *Esperanto*, 1975, majo, p. 88.

— Konfirmo de kontraŭneŭtraleca praktiko, en: *Horizonto*, 1979, januaro-februaro, p. 1-5.

— Konstruado de Moderna UEA (1948-1973), en: Ivo Lapenna k.a.: Esperanto en perspektivo, London / Rotterdam 1974, p. 548-634.

Lins, Ulrich: Analiza skizo pri la historio de la monda organizo, en: Ivo Lapenna k.a.: Esperanto en perspektivo, London / Rotterdam 1974, p. 413-506.

Milojević, Simo: 141 voĉdonoj pri 60 artikoloj, en: *Esperanto*, 1979, septembro, p. 148.

— Statuto kaj statutprojekto, en: *Esperanto*, 1978, decembro, p. 213-218.

Moritz, Uwe Joachim: Jura kontinueco de UEA, en: *Esperanto*, 1975,

marto, p. 41/42.

Privat, Edmond: Pri organiza problemo en Helsinki, en: *Esperanto*, 1922, p. 101.

Rousseau, Théophile: Internacieco kaj patriotismo, en: *Esperanto*, 20-a de februaro 1911, p. 1/2.

Stettler, Eduard: Hector Hodler. Lia vivo kaj lia verko, Ĝenevo 1928.

— La nova Statuto de UEA, en: *Esperanto*, 1920, oktobro, p. 186-188.

— Raporto de la komisiono por la revizio de la statuto, en: OD 1914, Ĝenevo 1914, p. 41-51.

Tonkin, Humphrey: Kelkaj ĝeneralaj konsideroj pri la Statuto, en: *Esperanto*, 1979, aprilo, p. 64/65.

— Pro neŝanĝemo ni riskas stagnon, en: *Esperanto*, 1978, decembro, p. 209-212.

Historio de la Historio de Esperanto

Abundo kaj malabundo

Historiisto kutime plendas pri troo da materialo, kiun trafosi daŭras eterne, aŭ pri maltroo da materialo, tiel ke profunda pritraktado de la objekto apenaŭ estas ebla. Simile, oni povas rigardi la historiografion de Esperanto sub la vidpunktoj abundo kaj malabundo.

Ekzistas abundo da verkoj kun rilato al la historio de la lingvo, de la movado, landaj aŭ fakaj movadoj, kaj krei bibliografion estus jam tre temporaba tasko je si mem. Bedaŭrinde multe da artikoloj aperas jen kaj jen en ofte nur etaj revuoj. Por iom longaj artikoloj mankas la spaco en revuoj, tiel ke ili devas aperi en apartaj broŝuroj. Foje iu sukcesas kolekti tiajn kontribuojn kaj aperigas volumon.

Sed same prave estas rigardi sub la vidpunkto de malabundo. Oni rajtas diri ke la faka nivelo de multaj kontribuoj ne estas tre alta. Ulrich Lins en 1988 konsoligis ke «apogeoj de diletanteco» kiel la historio de Courtinat estas maloftaj, sed la plej multajn verkojn li certe trafas per jenaj riproĉoj:

- Ĉefe, la aŭtoroj estas amatoroj, nehistoriistoj, kvankam tio ne nepre diras ke ili estas malseriozaj.
- La aŭtoroj ofte havas pedagogian tendencon kaj volas eduki la esperantistojn, doni al ili memfidon kaj kuraĝigi ilin. Sekve, oni emas transdoni mitojn kaj silenti pri malsukcesoj.
- Ili ofte kontentiĝas per kronikoj kaj priskriboj, sen profunde analizi sian temon.
- La plej multaj kontribuoj estas nedetalaj, supraĵaj aŭ tro ĝeneralaj.
- La kvanto de fontoj estas limigita, nur malmultaj aŭtoroj entreprenas penan serĉadon en arkivoj aŭ sisteman trastudon de la plej gravaj Esperanto-gazetoj. [1](#)

Por serioza historia studado necesas koni la ekzistantan literaturon, havi almenaŭ superrigardon. Se oni koncentriĝas je certa elekto de verkoj, tio estas tute ebla. Okupiĝante pri la «historio de Esperanto», oni povas dividi ĉiujn tutmovadajn prezentojn de aliaj, geografie aŭ teme limigitaj. Ankaŭ ne necesas mencii absolute ĉion, kio iam aperis sub la titolo «historio de Esperanto», kvankam oni povas fari esceptojn por mallongaj kontribuoj, se ili aperis tre frue.

La unuaj dek aŭ dukdek jaroj de Esperanto (1897) ankoraŭ ne kaŭzis multe da historiografiumado, krom kelkaj malgrandaj rerigardoj, kaj oni ankaŭ ne atendu pli. Sed la arĝenta jubileo de 1912 liberigis tutan ondon, komenciĝantan en 1911. En la antverpena Universala Kongreso la literatura konkurso havis la historion kiel temon, kvankam ne ĉiuj kontribuoj ĉi tie rilatis al tiu konkurso.

De Beaufront 1903/04

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Couturat kaj Leau 1907

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Fiŝer 1911

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Radvan-Ripinski 1912

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Clark 1912

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Zakrzewski 1911/13

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Privat 1923

Edmond Privat: Historio de la lingvo Esperanto. Unua parto 1887-1900. Universala Esperantia Librejo, 2-a eldono, Leipzig 1923 (Ĝenevo 1912). 74 p.

Dum Zakrzewski kaj Fiŝer havis dumepokan kaj relativan famon, Edmond Privat estas eble unu el la tri-kvar plej konataj figuroj de la Esperanto-historio mem. Tio parte rilatas al liaj funkcioj, kiel la prezidanteco de UEA (1924-28), al lia alloga personeco kaj retorika forto, sed precipe al la multaj diversaj verkoj, de legolibro, dramoj, poezio ĝis biografioj de Zamenhof kaj Gandhi. Kaj li akompanis la tutmondan Esperanto-historion sufiĉe longe, de 1903 ĝis sia morto en 1962, kun diverskialaj paŭzoj dum la unua mondmilito kaj la periodo 1934-51.

Privat modeste verkis en 1912 nur ĝis la jaro 1900, tiel lasante iom da spaco inter si kaj la prilaborita epoko, evitante la neceson mencii tute freŝajn okazintaĵojn, kiujn oni ankoraŭ malfacile analizas. Granda parto estis verkita jam en 1910, kaj la jubileon li prenis kiel okazon por fini la verkon (p. IX). Ĝi aperis en la «Universala Esperantia Librejo», la tiama libroservo de UEA.

La enkonduko estas originaleca: Ĉar Esperanto laŭ Privat nenion ŝuldas al Volapuko aŭ Bolak, li ligas ĝin al la historio de la hindeŭropaj lingvoj. Vivon ĝi ŝuldas al ĝia adeptaro, tiel ke la movada kaj lingva historioj estas interligataj (p. XI). Tio iomete malĝustas laŭ la movada vidpunkto, konsiderante ke kelkaj pioniroj estis eksvolapukistoj, ke la juna Esperanto-movado devis iom konkuri kun la volapuka. Pridiskutebla estas la opinio, ke ne nur la vortaro, sed «ankaŭ entute» la gramatiko venas el hindeŭropa fonto (p. 19). Tre fruktodona la aliro de Privat (kaj la tabelo kun hindeŭropaj lingvoj) ne ŝajnas esti, kaj ĝi ne estis imitata poste. Necesus pli strikte klarigi ĉu la temo de la historio estu la lingvo aŭ la komunumo.

Pri la deveno de Esperanto Privat ne mem verkis, sed uzis la Borovko-

leteron, kun la klarigo (preteksto?): «Multe pli bone estas ĝin citi ol ĝin difekti per analizo» (p. 10). Eble ĉar la Ido-krizo estis por Edmond Privat (verkanta en 1910) ankoraŭ tre freŝa, li tre emfazas la negativajn flankojn de de Beaufront kaj de lia influo sur la lingvon kaj propagandon, tamen ne povante nei lian valoron por la movado (p. 62 kaj sekvaj). La franca periodo laŭ la divido de Privat daŭris tre mallonge, li lasis ĉesi ĝin jam en 1900, la fino de lia maldika verketo.

Möbusz, Brüggemann, Ladevèze 1921-23

Albin Möbusz: Dokumentoj de Esperanto. Informilo pri la historio kaj organizo de la Esperanto-movado, Berlin 1921. 198 p.

Karl Brüggemann: Historio de Esperanto. kun la paroladoj, leteroj ktp. de D-ro Zamenhof, kreinto de la lingvo Esperanto, Dresden 1923. 160 p.

René de Ladevèze: Demandaro pri la Historio, Literaturo kaj Organizaĵoj de Esperanto por Esperantaj Ekzamenoj, 2-a, rev. kaj kompl. Hermann Göhl, Berlin kaj Dresden 1923 (Dresden 1911). 111 p.

Post la unua mondmilito aperis en mallonga sekvo tri kompilaĵoj kun historiaj tekstoj, foje kun historiografia aldono.

Albin Möbusz transprenis ekzemple la artikolon de Leopold Einstein el 1884 pri la planlingva historio, tekstojn pri Zamenhof, eĉ tekston el Privat 1912 kaj kongresparoladojn de Zamenhof. Sekvis tekstoj pri la organiza historio kaj literatura montrilo. La kompendio de Möbusz ŝajnas esti tute utila, en la tiama epoko, kvankam ĝi foje povus esti pli preciza. En la antaŭparolo (el 1920) li esprimis sin tre optimisme pri la taŭgeco de tiu libro por klerigi la esperantistaron (p. 3/4).

Ankaŭ Karl Brüggemann kompilis paroladojn kaj leterojn de Zamenhof, sed ne nur. Lia mallonga historio komencis jam antaŭ Esperanto, sekvante ĉefe al Einstein 1884. Glitante ekde la periodo de la mondmilito en la aktualan staton de la movado, li certgrade koncentriĝis pri la germana movado. Ankaŭ li avaras pri la mencio de fontoj.

La verketo de René de Ladevèze (1885-1913) estas «demandaro» por prepari kandidatojn de Esperanto-ekzamenoj. Hermann Göhl eldonis en 1923 reviziitan version. La demandaro funkcias laŭ la metodo de

demandoj kaj respondoj, kun foje iom tro longaj respondoj por parkeri.

Privat 1927

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Drezen 1931

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Isbrücker 1932

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Enciklopedio 1934

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Støp-Bowitz kaj Isbrucker 1948

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Jakob 1958

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Waringhien 1959

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Courtinat 1964-68

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Esperanto en perspektivo 1974

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Pechan 1979

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Forster 1982

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Auld 1988

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Støp-Bowitz 1996

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Van Oostendorp 2004

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Korĵenkov 2005

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Konkludo

Verki pri Esperanto-historio estas malfacile, kaj komparoj al grandaj nacioj kaj naciaj lingvoj estas vanaj: la Esperanto-komunumo ne povas provizi al siaj historiistoj la saman gradon de subteno kiel ekz. Federacia Respubliko Germanio al siaj. La ĉefaj mankoj estas eduko, tempo kaj financa subteno, kaj nur malofte eblas al privata esperantisto kompensi tion. La sekvo estas manko de kvalito, kaj nur malmultaj el la verkoj menciitaj daŭre utilas, precipe la informbrikoj «Enciklopedio de Esperanto» kaj «Esperanto en perspektivo».

Por plibonigi nian historiografion necesas unuapaŝe pli bona eduko; serioza historiografio meritas pli ol nurhobian nivelon. Kaj, verkado historiografia ne funkcias izole. Verko apartenu al tuta reto da aliaj verkoj. Studoj, monografioj esploras unuopajn problemojn; surbaze de tiuj monografioj verkiĝas superrigardoj kaj manlibroj; tiuj verkoj helpas verki lernolibrojn pri Esperanto-historio. Tia reto ankoraŭ nur tre fragmente ekzistas. Necesas tial ne verki plian «Historion de Esperanto», en la formo de skizo aŭ superrigardo, sed kontribui senchave al la reto.

1908: Centraj Oficejoj de UEA en la svisa epoko

Post preskaŭ kvindek jaroj en Nederlando, Universala Esperanto-Asocio facile forgesas siajn svisajn originojn. Ses adresojn ĝi havis inter 1908 kaj 1960, ĉefe en Ĝenevo, sed ankaŭ unu jaron en Berno. La svisa epoko de UEA malgraŭ ĉiuj ŝanĝiĝoj kaj organizaj reformoj restas parto de la fundamento.

Strato Bovy-Lysberg

Hector Hodler kaj amikoj estis subluantoj en la Scienca Oficejo de René de Saussure, kiu tre modestsume disponigis ĉambreton en 8, rue Bovy-Lysberg. Propagandinte la ideon de Alphonse Carles pri reto de Esperanto-konsuloj kaj -oficejoj, la junuloj fine de 1907 enketis ĉu ekzistas interesiĝo pri «fortika organizo». La 28-an de aprilo 1908 estis fondita Universala Esperanto-Asocio. Ĝia lulilo estis jam de longe pretigita, kun revuo *Esperanto*, la kunsidoj dum la ĉiujara kongreso kaj do la oficejo en Ĝenevo.

Borsa strato

Jam en aŭtuno 1909 la rapide kreskanta Asocio translokiĝis al la proksima adreso 10, rue de la Bourse, kion rusa samideano tradukis iam per «strato de la monujo». Tie la Centra Oficejo de UEA havis tri modeste meblitajn ĉambrojn, ĝis oni akiris en julio 1914 du pliajn ĉambrojn je la sama adreso – jen UEA okupis la tutan teretaĝon. Hodler, vivanta tiam je modesta rento donita de la patro, loĝis longan tempon en ĉambreto de la oficejo: «fera lito, kelkaj tabloj kaj seĝoj krakemaj, areto da libroj, malmultaj personaj memoraĵoj, jen ĉio», skribis amiko. En 1910 la Asocio enkondukis la postenon de direktoro, por gvidi la oficejon en Ĝenevo. Hodler fariĝis, honorofice, la unua direktoro en la historio de UEA, kvankam li estis jam redaktoro de sia daŭre privata gazeto

Esperanto kaj «komitatano pri la administra fako».

Eduard Stettler, esperantisto ekde 1908, de 1909 ĝis 1911 restadis en Ĝenevo por volontuli en la oficejo. La juristo kaj ido el riĉa familio en Bern priskribis poste la grandajn laborojn, kiujn la fondintoj planis, kaj komentis:

Por tia entrepreno dekdu da oficistoj estus ĝuste sufiĉintaj. Kion mi trovis alveninte en Ĝenevo por helpi Hodler-on? Ĉambro-keston, malgranda, je ordo kaj pureco en miaj okuloj dubaj, kun kelkaj krudaj abiaj tabloj kaj bretaro laŭlonge de unu muro. Ĉe la fenestro Hodler; unu oficisto rusa, inteligenta kaj malordema [...].

Hodler baldaŭ konfidis al Stettler estradon de la oficejo kaj la kason, kiu fakte estis lada kesteto, kun «koncerna libreto kun notoj pli bonintencaj ol uzeblaj. Kelkajn monatojn poste, en Rue de la Bourse, la oficejo jam aspektis pli oficeje, dank' al skribmaŝino, malnovaj mebloj donacitaj kaj novaj bretaroj ne-pentritaj.» Dum la oficiala malfermo oni plenkore ridis pri komerca vojaĝisto, kiu ftiom serioze kaj elokvente rekomendis ferajn monŝrankojn en ĉiuj grandoj, garantiitaj per atestoj de bankoj, ke li ne ekkomprenis nian ĝojon. Alvenis pliaj oficistoj, bonaj kaj malbonaj, honestaj kaj aliaj, ĉiam tre malalte pagitaj, ĉiam nesufiĉaj laŭ nombro.

Kiel nehonestan oficiston Stettler celis precipe la kasiston D. Zirlin, kiu en februaro 1913 forkuris kun la kaso.¹ Laŭ raporto de Hodler el septembro 1910, laboris ses homoj en la oficejo. Li mem okupiĝis pri administrado kaj gazeto *Esperanto*, same sensalajre kiel Stettler, la respondeculo pri financoj kaj libroservo. La aliaj kvar oficistoj estis pagataj el la enspezoj de la libroservo, de la gazeto aŭ de UEA, depende de la taskoj.

La komenciĝo de la unua mondmilito lamigis la laboron de UEA. De unu semajno al la alia, preskaŭ du trionoj de la membraro ek troviĝis en «malamikaj» landoj. Sed en 1915 oni daŭrigis la gazeton kaj instalas korespondan servon kun interpretado. Kompare kun aliaj tiaj servoj niaj monpostuloj estis modestaj, rememoris Stettler, sed la agado favore konatigis la oficejon kaj alportis belan enspezon.

Muzea strateto

Post la milito Hector Hodler fariĝis prezidanto kaj Eduard Stettler direktoro. Ĉar Stettler ne povis denove veni al Ĝenevo deĵori, la Centra Oficejo venis al li. La nova adreso ekde majo 1919 estis Museumsgasse 14, iom ekster la centro de Berno. Eble tio estis pli favora ankaŭ el kosta vidpunkto, ĉar la ĉambroj en la bursa strato, kostintaj ĝis la fino de la milito mil okcent frankojn, postulis poste kvinmil kvarcent de la asocia kaso. Sed baldaŭ poste, en marto 1920, mortis Hodler. Direktoro Stettler skribis en la gazeto *Esperanto* ke li ricevis de la vidvino la rajtojn je la gazeto *Esperanto*, la bibliotekon de Hodler (jam en la oficejo) kaj valorpaparojn je proksimume cent sepdek mil svisaj frankoj (la tiama kotizo por Membro-Jarlibro estis 2,50 fr.). Tiu hereda kapitalo «certigos por ĉiam modestan ekziston de la oficejo», li opiniis. Por ŝpari heredo-impostojn, oni retranslokiis la oficejon al Ĝenevo, ĉar tie la impostoj estis malpli altaj. Publika preteksto por la rapida ŝanĝo de sidejo estis la nova Ligo de Nacioj, kiu en 1920 venis al Ĝenevo. Tamen, la najbareco de la Ligo apenaŭ donis ian avantaĝon al UEA.

Bulvardo de l' Teatro

La jaro 1920 estis granda mejloŝtono en la historio de UEA, kiam finiĝis la eksperimentaj jaroj kaj la baza rekonstruado post la milito. Stettler ellaboris novan statuton, li mem fariĝis la unua prezidanto laŭregule elektita post la morto de Mudie en 1916. Edmond Privat, eĉ pli malnova amiko de Hodler, transprenis la gvidon de la gazeto. Hans Jakob, oficisto ekde 1912, ekrespondecis pri la Centra Oficejo nun en 12, Boulevard du Théâtre, en Ĝenevo. Tiu triopo, foje kun aliaj funkcioj, estis gvidonta la Asocion ĝis 1934, kiam la naciaj societoj transprenis la ŝipon.

Supraĵe la 1920-aj jaroj estis oraj por la Asocio, kiam ĝi ofte havis pli ol 8 000 aŭ 9 000 membrojn. Malgraŭ tio, konstanta problemo restis la deficitaj, kiuj forfrandadis la kapitalon, kaj tiu epoko plenis de skandaloj kaj bataloj forgesitaj intertempe. Plia ĝenaĵo estis la sekvoj de la milito, precipe la estiĝo de novaj landlimoj kaj la malfaciliĝo de mona interŝanĝado. UEA perdis multe da mono kiam ekzemple kolektitaj kotizoj estis blokita en iu lando kaj senvaloriĝis pro inflacio.

Insula Turo

La 23-an de aŭgusto 1929 sep fortuloj komencis la transporton de 140 kestoj, raportas *Esperanto*. Oni facile komprenas la entuziasmon de Hans Jakob pri la nova adreso Tour de l'Ile. Temis fakte pri turo sur insulo rivera, kaj UEA luis spacon supre. La nombro de la ĉambroj restis la sama, sed la novaj naŭ estis multe pli grandaj.

En interna raporto, direktoro Jakob konfesis etan malavantaĝon: la supreniro konsistis el 130 ŝtupoj, kaj la lifto estis uzebla nur por tiuj oficistoj kiuj havis ŝlosilon. Sed la antaŭa oficejo estis tro malgranda, mankis deca ĉambro por okazaj vizitoj. Diplomatece, Jakob skribis nur ke tiu tura oficejo kostis malpli ol aliaj lokoj viditaj, sen informi pri la diferenco al la antaŭa lupago. «Unuafoje ni povas nun lokigi nian grandan bibliotekon en konvenan ĉambron, kiu samtempe servas por akcepti vizitantojn, kiuj ne mankas.» ²

La eŭforio ne povis daŭri longe. En oktobro 1929, nigra vendredo krevigis la spekulacion de *Wall Street* en Novjorko, kaj dum la venontaj jaroj la financa krizo atingis Eŭropon. Politikaj krizoj sekvis. Tiuj tempoj estis turbulaj ankaŭ interne de la neŭtrala Esperanto-movado, ĉar la naciaj asocioj postulis novan organizon. Kvankam ŝajnis ke la Interkonsento de Kolonjo 1933 prezentis kontentigan solvon, la konfliktoj rapide revenis. Kiam en marto 1936 la Estraro de Louis Bastien volis transloki la Centran Oficejon al Londono, kelkaj svisoj sub la fakta gvidado de eksdirektoro Hans Jakob entreprenis proceson ĉe la Tribunalo de Ĝenevo. Ĉar la Estraro timis baldaŭan bankroton, Bastien alvokis en septembro 1936 la movadon sekvi lin al nove fondita Internacia Esperanto-Ligo. UEA en Ĝenevo fariĝis orfo, ĝis en oktobro 1936 «provizora komitato» transprenis la gvidadon.

Palais Wilson

La 1-an de julio 1937 la malgranda, «ĝeneva» UEA iris al nova loko, en Palais Wilson. En tiu eksa sidejo de la Ligo de Nacioj nun hejmis diversaj internaciaj asocioj. Jakob, denove direktoro, funkciigis la Asocion ĝis 1942. Post la dua mondmilito okazis kunfandiĝo de Internacia Esperanto-Ligo kaj de la ĝeneva UEA, sub la malnova kaj nuna nomo. Tiam, en 1946/1947, oni konsentis pri certa taskodivido inter la du oficejoj: en Britio la Administra Centro okupiĝis pri administrado kaj libroservo, dum

la Serva Centro en Ĝenevo (gvidata de Jakob) gardis la bibliotekon kaj redakcion. Fakte la Serva Centro en la Palais Wilson estis ne pli ol kela ĉambro, kie situis libroj kaj arkivaĵoj, kaj la laborĉambro de Jakob, kiu pludeĵoris tie por la ŝtato. En 1960 la Komitato decidis haltigi la oficon de Jakob, kaj kiam en 1980 nova statuto ne plu menciis la Servan Centron, la svisa epoko de UEA definitive finiĝis.

1927: Esperantistaj Respondkuponoj: «Vi rajdas UEAn en fincan aventuron»

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

1930: Loknomoj en la Jarlibro «sen rajto de ekzisto»

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

1932: Brita Asocio kontraŭ Edmond Privat

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Vojaĝo politika

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Reagoj el Britio

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

La vidpunkto de UEA

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Kontraŭeto

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

1935: UK en Italio kaj Afriko

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Unua kongresa semajno: «Por Italia»

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

«Mankas vortoj por priskribo»

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Jung: «Nenia ordo, nenia organizo»

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

«Mortigu ilin, disfrakasu ilin»

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

48 gradoj Celsius en Afriko

